Jarkolekto : 2008 | Numero : 4 | Paĝo : 1

# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri ***Senlime*** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

***Senlime***
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
Esperantista Grupo de Verviers
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 3 EUR**
**Jara abono : 10 EUR**

Bonvolu pagi, prefere decembre aŭ januare, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La kotizo (nedeviga sed bonvenigata) estas disigita de la abono al la papera versio de tiu-ĉi informilo (kompreneble pagenda).

# Senlime

## *invitas vin al la Zamenhof-festo en Select (Kelmis), dimanĉon, la 14an de decembro je la 11h30.*

**Informas** Mathieu **Schrymecker** XX-32-(0)87-853389

**Programo**
malfermo de la akceptejo je la 11h30 (Lütticherstr. 264) ; bankedo ; kulturaj eroj (interalie klarigoj de M. Schrymecker pri la fino de lesperanto ŝtato Moresneta).

**Prezo** : 25 EUR (trinkaĵoj krome pagendaj – deviga rezervado kaj pago **antaŭ** la 6-a de decembro – aliĝilo p.5).

## *Senlime* membronombras !

Estas konate ke multaj homoj tute ne interesiĝas pri statutaj aferoj kaj sen surprizo ankaŭ ***Senlime*** spertas tiun problemon.

La renovigita statuto de ***Senlime***, kiu forviŝis la devigan aliĝkotizon, tamen antaŭvidas ke ĉiu membro iamaniere kunlaboras (ĉu per sia propra laboro, ĉu per alia rimedo… ekzemple pago de kotizo).

Diverskiale, ***Senlime*** devus (kaj kompreneble ŝatus) koni siajn membrojn.

Konforme al la statuto, ĉiu responsema homo kiu sin konsideras kiel membro de ***Senlime*** bonvolu anonci sin per la aliĝilo trovebla p. 5.

Ne absolute necesas limak-poŝte resendi ĝin : vi ankaŭ rajtas uzi la ret-eblecojn tiucele (kopiu kaj gluu laŭplaĉe !). Viaj informoj estos konservataj kaj (se ili ne ŝanĝiĝos) vi estonte ne plu bezonos sendi la diversajn aliĝilojn (la faritaj pagoj pruvos vian partoprenon)

Koran dankon pro via kunlaboro.

La komitato.

# Niaj programeroj lupee

## *detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…*

### Planedoj k. steloj per komputilo

Por la astronomo, ne gravas ĉu profesia aù amatora, pro la apero de la aŭtomataj muntumoj kaj de la kameraoj kun CCD-kaptiloj, la informadikaj softvaroj iĝas pli gravaj ol la observiloj mem.

La softvaroj pri ĉiela kartografio kaj virtuala planetario enhavas datumaron uzitan por ebligi la necesajn kalkulojn antaù la afiŝado sur la ekrano de la diversaj ĉielaj objektoj. Per kelkaj el tiuj softvaroj, eĉ eblas de fore piloti tutan observejon (kameraon kaj kupolon).

Uzo de softvaro ankaù necesas por prizorgi la astronomiajn bildojn. Ili povas substreki detalojn kajkunigi bildojn post la traktado (la observiloj ne havas sufiĉan vidkampon por komplete foti vastan astron). Suplementa funkcio ebligas kunmeti bildojn el ĉiuj koloroj (la observiloj ofte estas unukoloraj), kion oni nomas “kompozitado”.

Aliaj softvaroj estas uzitaj por koncepti observilojn (teleskopoj, …).

Informadik-ŝatantoj volonte uzos eksterteran-flugsimulilon kiel ORBITER. Sed atentu, tute ne temas pri pafludo ! La softvaro klare celas realismon kaj lernadon (de astronomiaj kaj mekanikaj bazoj).

**11-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: “**Planedoj kaj steloj per komputilo**” (prelego de Didier Lousberg).
Inf. lousberg@senlime.org

### Zamenhof-festo

Kiel aliaj esperantistaj grupoj, ni ĉiujare festas la datrevenon de naskiĝo de Zamenhof.
Sed multaj forgesas, ke tiu tago estis elektita kiel tago de literaturo kaj libro en esperanto.

Senlime kompreneble specife klopodas senlimigi tiun temon kaj do ĉiam plilarĝigas siajn kulturajn erojn al ludo, radio, televido, muziko, kino, teatro, k.t.p... prefere el diversaj landoj.

Ĉi-jare gravos la muzika parto, kun niaj tradiciaj kantoj (de ”la espero” al ”la iamo longe for”), kun antaŭvidita partopreno de nia pianisto Klaus Hogen.

Neniam ni forgesas nian duan specifon, la historian grundon sur kiu baziĝas nia ekzisto, tio estas ”Amikejo”, la projekto pri esperantigo de la iama Neŭtrala teritorio de Moresnet (fakte la nuna Kelmis). Ĉi-jare nia loka historiisto, Mathieu Schrymevker koncize raportos al ni pri la fino de tiu ***freneza aventuro*** en 1908, kio ankaŭ definitive fermos la paĝon de niaj 100-aj datrevenoj.

Pro tio, niaj kunvenoj kaj nia tradicia Zamenhof-festo okazas en la iama esperantista kultur-centro de Neŭtral-Moresnet: la trinkejo kaj restoracio ”Select” (264 Lütticher Strasse, BE-4720 KELMIS).

**12-14** 11h30 BE-Kelmis, Select : nia **Zamenhof-festo** (100a datreveno de Amikejo).
Devigaj aliĝo kaj antaŭpago p. 5.
Inf. jacques@senlime.org

### Internacia Festivalo

Partoprenantoj en la 25a Internacia Festivalo de Düsseldorf (27 dec. – 3an de januaro) venos al Kelmis kadre de tuttaga ekskurso: ili tagmanĝos en Select kaj vizitos la iaman Amikejon. (rekontiĝo kun ***Senlime***-membroj estas dezirita).

Internacia Festivalo (IF) ofertas specifan programon por la meza generacio kaj familioj (kun aŭ sen infanoj). IF okazas sub profesi-nivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare 160 - 200 personojn el ĉ. 20 landoj.

IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj sed laŭdezire ĝi ofertas elementajn kaj / aŭ paroligajn kursojn, ekzemple por via partnero.

Krom kursoj, promenoj, tuttaga ekskurso, vespera koncerto, magio kaj danco, silvestraj balo kaj internacia vespero, ĝi proponas varian programon kaj altnivelaj prelegoj pri la kadra (ĉi-jare : literaturo) kaj aliaj temoj :
- Mikaelo Bronŝtejn, aŭtoro kaj bardo el Rusio: Interkona vespero
- Ĵak Le Puil, kanzonisto el Francio: Koncerto kun kantoj el 30-jara repertuaro
- Triksini, magiisto el Germanio: Tutsemajnaj magia kaj pupteatra seminarioj.

«Plilongiga tago» okazos la 4-an de januaro: vizito de kastelo Benrath, de la televida turo.

**12-30** BE-Kelmis, kadre de ***I.F.*** de Düsseldorf, tuttaga ekskurso al nia regiono: manĝo en Select
Inf. HDP@internacia-festivalo.de

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2008 (2/2)

**Senlime Esperanto Kalendaro**

***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**10-17** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Kastelo de Maulnes***" (prelego de Klaus Hogen).
Inf. hogen@senlime.org

**11-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: "***Planedoj kaj steloj per komputilo***" (prelego de Didier Lousberg).
Inf. lousberg@senlime.org

**12-14** 11h30 BE-Kelmis, Select : nia **Zamenhof-festo** (100a datreveno de Amikejo).
Inf. jacques@senlime.org

**12-30** BE-Kelmis, kadre de ***Internacia Festivalo*** de Düsseldorf, tuttaga ekskurso al nia regiono: manĝo en Select kaj vizito de iama Amikejo (horo jam ne konata).
www.internacia-festivalo.de
Inf. HDP@internacia-festivalo.de

**01-16** 19h30 BE-Kelmis, Select : "Mia nova paradiza ĝardeno" – 2 far' J. Jacob

✪

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la : **01-16, 02-20** (Ĝenerala asembleo), **03-20, 04-17, 05-15** kaj **06-19** (Karaoke).

**17-10** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Le Château de Maulnes**" (conférence de Klaus Hogen).
Inf. hogen@senlime.org

**21-11** 19h30 BE-Kelmis, Sélect: "**Planètes et étoiles par l'ordinateur**" (conférence de Didier Lousberg).
Inf. lousberg@senlime.org

**14-12** 11h30 BE-Kelmis, Sélect : notre **fête Zamenhof** (100e anniversaire d'Amikejo).
Inf. jacques@senlime.org

**30-12** BE-Kelmis, accueil des participants au ***Festival International*** de Düsseldorf, (excursion vers notre région): repas au Sélect et visite des vestiges de l'Amikejo (heure à préciser).
www.internacia-festivalo.de
Inf. HDP@internacia-festivalo.de

**16-01** 19h30 BE-Kelmis, Sélect : "Mon nouveau jardin paradisiaque" – 2 par J. Jacob.

✪

Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **16-01, 20-02** (assemblée générale), **20-03, 17-04, 15-05** et **19-06** (karaoké).

# Festo honore al Amikej✪

## okazis en Bruselo iniciate de la Civito

***Kelkaj eminentaj Civitanoj kaj membroj de Senlime kuniĝis en Brusela "hotelo de la Kongreso", la 26an de julio 2008, memore al Amikejo*** *(neeblis organizi tiun feston en Kelmis, ĉefe pro transportaj kaj pli subtilaj organizaj problemoj pristudindaj de nia* ***Senlime****-komitato kaj de la lokaj urbaj instancoj).*

Post enkonduka saluto al la gepartoprenantoj nome de ***Senlime***, mi helpe de mallonga filmo virtuale akompanis ilin en Amikejon. Mi ankaŭ reliefigis ke se (ŝajne definitive) malsukcesis la projekto pri sendependa ŝtato en Moresnet, ja pluvivas tiu pri Amikejo.

Honore al la epizodo de Amikejo, G. Silfer, Konsulo de la Civito, invitis nin rememori ke ni samjare festas ankaŭ la sesdekan dat-revenon de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj kaj la dekan datrevenon de la Pakto de la 10a de aŭgusto 1998, kiuj estas fundamentaj referencoj por la Esperanta Civito. Tio estas eksterordinara okazo por mediti pri la signifo de esperantisteco, samideaneco, civitaneco. Ĉar "*Ni estas pli ol samideanoj. Ni estas civitanoj. Nome, ni estas esperantismanoj edukitaj al la civitaneco. La civitaneco baziĝas sur la demokratio, kaj la demokratio baziĝas sur la homaj rajtoj. Tio estas la nova Esperantio.*" Sekvis interesa meditado pri paco kun analizo pri naciŝtato kaj instigo atenti pri la ŝanĝoj en la monda organizo kaj la reformo de Unuiĝintaj Nacioj, necesaj pro diversaj malkongruoj - inter kiuj la malsufiĉa agnosko pri la rajtoj de la popoloj sen ŝtato (inkluzive de la esperanta popolo)...

Ilustre, la hungarino Anna Bartek, konata sub la artista nomo "**Anjo**", kantis (bonege kvankam sen akompano muzika!) la poemon "*Popol' ni estas*" de Emeriko Baranyai (Emba), kiun G. Silfer menciis ("*Standardo nia, de sangverŝo pura, / portas koloron verdan de l'esper*'").

Ŝia repertuaro ampleksas modernajn, klasikajn kaj ekleziajn kantojn kaj mi interalie ege konsilas al vi ŝian K-diskon "Bela Revo"

Kompreneble, la festo finiĝis kiel decas per bongusta kaj bonetosa bankedo... en apuda restoracio ***La freneza Aventuro***.




Dankon al G. Silfer kaj la Civito por ilia intereso pri Amikejo.
La kompleta teksto de la parolado de la Konsulo estas legebla en "Literatura Foiro" n-ro 234 (aŭgusto 2008).

Post tio, nepre sin metas la demando ĉu ***Senlime***, kiu ŝajne sin rekonas en «la Kvintezo» de la Pakto por la Esperanta Civito, ankaŭ iĝu unu el la paktintaj establoj…

J-M. Jacques

Giorgio SILFER naskiĝis en 1949 en Milano. Doktoro pri literaturo kaj beletristiko, li estas lingvoinstruisto, organiza konsil-isto, verkisto kaj publicisto, kaj unu el la ĉefaj iniciatintoj de la Esperanta Civito.

Li kunfondis en 1970 la revuon Literatura Foiro kaj en 1980 la kooperativon de Literatura Foiro, kiu posedas kaj eldonas la menciitan revuon, kaj ekde 1997 ankaŭ la gazeton Heroldo de Esperanto.

En 1980 li (kun aliaj) lanĉis la Manifeston de Raŭmo. En 1985 li kunfondis la staĝejon La Kvinpetalo, en Francio kaj en 1991 la Esperanto-Centron de PEN-Klubo Internacia, en kies mondkongreso li sukcesis, kun sia edzino Perla Martinelli, atingi la agnoskon pri Esperanto kiel literatura lingvo.

Kun aliaj en 1995 li transprenis la gvidadon de Kultura Centro Esperantista en Svislando, kaj tiel savis ĝin de jam anoncita malfondo. En 1996 li estis inter la ĉefaj subskribintoj de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj.

Giorgio Silfer verkis tri poemarojn, plurajn teatraĵojn, romanon, diversajn literatur-sciencajn kaj interlingvistikajn librojn. Li gajnis Premion "La Verko de la Jaro" en 1977 kaj estis proklamita en 1984 "Florluda Majstro". Li ankaŭ verkis aŭ tradukis kelkdekon da kanzonoj, precipe por Gianfranco Molle, Nikolin' …kaj Anjo Amika.

Informoj pri Anjo sur la reto che
http://www.musicexpress.com

# Aliĝilo al *Senlime* – Jaro(j 2008 kaj) 2009

Ĉiu (re)membriĝanto nepre kompletigu apartan dokumenton (aŭ fotokopion) kaj alvenigu ĝin antaŭ la 31a dedecembro al
Jean-Marie **Jacques**, rue J. Wauters 5, B-4800 VERVIERS, ☎ + 32 **87/ 33.02.92** (jacques@senlime.org)
Forstreku la nevalidajn menciojn kaj krucumu la elektitajn alternativojn

S-ro/S-ino/F-ino: ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌
Naskiĝdato: familia nomo (por alfabeta ordigo)

⎿⏊⏌ ⎿⏊⏌ ⎿⏊⏌ ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌
jaro monato tago antaŭnomo aŭ persona nomo

Adreso: ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌
strato kaj numero

⎿⏊⏌ ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌ ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌
landa kaj urba kodoj urbo

⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌ ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌
tel. n-ro (kun zona prefikso) faks. n-ro (kun zona prefikso).

e-adreso : ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌ @ ⎿⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏊⏌

legis, komprenis kaj aprobas la aliĝ-kondiĉojn kaj konfirmas mian membriĝon al ***Senlime*** por la jaro(j 2008 kaj) 2009 konforme al la novaj statutaj reguloj.

estas kunlaboranto de ***Senlime*** do **NE** pagas la jaran aliĝkotizon

ne povas/deziras mem persone kunlabori kun ***Senlime*** kaj do pagas jaran kotizon da (minimume) 10 EUR por 2009
al la konto : **979-5327148-10** (IBAN : BE41 9795 3271 4810, BIC : ARSPBE22, banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio (la abono al la papera informilo estas krome pagenda).

partoprenos la **Zamenhof-feston** la 14-an de decembro en Kelmis (Select) kaj
**hodiaù** antaùpagas la devigan kaj nerepageblan aliĝ-kotizon da :

25 EUR (trinkaĵoj krome pagendaj)

20 EUR pro rabato (20 %) **Rabaton** da 20 % (6 EUR) ĝuas **NUR** junuloj < 26 jaro
al la konto : **979-5327148-10** (IBAN : BE41 9795 3271 4810, BIC : ARSPBE22, banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

**NE** partoprenos la Zamenhof-feston.

Dato: ⎿⏊⏌ ⎿⏊⏌ ⎿⏊⏌ Subskribo:
jaro monato tago

---

La paganto klare indiku la celon de la pago, ekzemple: "Aliĝo al Zamenhof-festo por ***x x x nomo x x x***".
La membro-kotizo por ***Senlime*** koncernas la civilan jaron kaj estas principe pagenda antaŭ la 31-a de januaro de la koncernata jaro (post tiu dato, ni ne povas garantii la liveradon de la informilo, k.t.p...).

La kotizo (nedeviga sed atendata) al ***Senlime*** neniel plu rilatas kun la abono al nia surpapera informilo «***Voĉo de Amikejo***».

Ne-membroj de Euxropa Komunumo nun praktike povas esti membroj de nia asocio sed ***Senlime*** mem ne sendas la (surpaperan) informilon ekster sia trilanda regiono (BE-NL-DE).

**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

# Rapport annuel (extraits)

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte
n°: **000-0245571-64**
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
(Banque de la Poste)
de:
Esperanto grupo
25 Rue Pierre Fluche
BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime**, restée inchangée depuis sa création, est maintenant facultative et laissée à l'appréciation de chacun (mais l'abonnement à ce bulletin en version «papier» reste payant : 10 €).*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2009** (EGV) **14 €**
**U.E.A. 2009** (MA) **59 €**
***Senlime*** **(abonnement 2009) 10 €**

**en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire, l'année *«cotisation de …. pour ….»*.**

**Juillet 2007 : 92$^{e}$ Congrès Universel à Yokohama (Japon)**

Le Congrès de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA) reste l'événement annuel le plus marquant. Il faut en effet avoir vu une fois dans sa vie 2000 personnes de 70 nationalités et langues différentes se parler et se comprendre sans interprète... La saison des vacances est l'occasion de pratiquer l'espéranto de bien d'autres manières. C'est pourquoi notre groupe est à ce moment mis «en veilleuse»...

**14 octobre : Trilanda Renkontiĝo – projection du film « Incubus » (100e anniversaire du groupe)**

Nous ne pouvons passer ici sous silence nos traditionnelles "***Trilanda***"s (rencontres des espérantistes des 3 pays: BE - DE - NL) : vu leur intérêt (culturel et pédagogique) pour nos membres, nous avons organisé une rencontre exceptionnelle à Verviers, le 14 octobre 2007 à l'occasion du 100$^{e}$ anniversaire de notre groupe, avec réception à l'Hôtel de Ville, banquet et projection de ***«Incubus»*** (1$^{er}$ film commercial réalisé en espéranto – projection précédée d'une présentation «powerpoint» de la langue) en présence de non-espérantistes locaux (nous avons à cette occasion loué le Centre Duesberg et obtenu une attention particulière de la presse locale (Le Jour, TéléVesdre,…). Par contre, aucune rencontre de printemps n'a eu lieu, faute d'organisateur *(une tournante entre les différents groupes de l'Euregio était pourtant l'usage…)*

**Décembre 2007: Maintenance de nos sites "Web"**

Nous avons comme chaque année profité de la période des fêtes pour effectuer les «retouches» nécessaires à nos nombreuses pages web actuellement regroupées aux adresses http://www.senlime.org/ et http://www.senlime.be/. Il se confirme en effet que de nombreuses personnes apprennent les bases de l'espéranto, sans suivre de véritable cours, quasi-uniquement grâce à nos pages sur le web.
L'hiver est également, avec ses longues soirées, le moment idéal pour **le sous-titrage de films** en espéranto, désormais spécialité du groupe de Verviers, et la préparation des **karaokés de *Senlime***.
*Ce matériel nous sera d'une grande utilité pour l'organisation de stages d'apprentissage ou pratique de l'espéranto.*

**20 juin 2008 : second karaoké de *Senlime* en espéranto**

Cette activité trouvera probablement en juin, à la fin de chaque saison, sa place définitive dans nos programmes, vu sa haute valeur pédagogique : nous n'avons pas été de simples «consommateurs» mais avons également traduit/adapté quelques chansons françaises (ou belges, comme ***«Amsterdam»*** de Brel).

J-M. **Jacques**